

## Kio okazos hodiaŭ?

★ **3:30 ptm: skajpumado!**

Kie: salono de Hoss kaj Liĉjo,  
Asante #127.

★ **7:30 ptm: Juan prezentas**

Kie: la komuna salono en *Cuzco*.  
Temo: “*Pri mia stranga maniero kompreni nian heroan spiritan fraton, Jesuon el Nazareto.*”

## Ĉu vi skajpumas?

**S** Skajpo (angle: *Skype*) estas programo por reta babilado kun video. Ĝi estas libere elŝutebla kaj funkcias glate en diversaj operaciumoj, ekzemple Vindozo (*Microsoft Windows*), Makintoŝo (*Apple Macintosh*), kaj Linukso (*Linux*). Per ĝi oni povas senpage babilu kun aliaj Skajp-uzantoj tra la mondo.

Lastatempe Skajpo fariĝis vaste uzata en Esperantujo, kaj esperantistoj multe helpis adapti la programon. La tekstoj en ĉiuj ĝiaj menuoj, butonoj, fenestroj ktp) haveblas en Esperanto, kaj oni povas eĉ serĉi per la programo aliajn Esperanto-parolantojn por kumbabilado.

Por tiuj, kiuj ankoraŭ ne spertis Skajpon, Hoss starigos mallongan babiladon hodiaŭ je 3:30 ptm kun Simono KEITH, eks-NASKano en Koloradio. Venu al Asante #127 por vidi, aŭskulti, kaj—se vi kuŝas—babili rete.

## Gramatika angulo

de Lee MILLER/Liĉjo

*Li vidis la rondan tablon en la ĉambro.*

Ĉu en tiu ĉi frazo la frazero “en la ĉambro” nepre rilatas al la tablo? Ĉu ĝi povus rilati al “li”? Tio estas, ĉu eblas scii kie estas “li”, kaj kie estas “la ronda tablo”, nur per la strukturo de la frazo?

La frazo efektive estas ambigua. Eblaj sencoj inkluzivas: a) “Li [kiu estis ekster la ĉambro] vidis la rondan tablon [kiu estis en la ĉambro]”; b) “Li [kiu estis en la ĉambro] vidis la rondan tablon [kiu estis ekster la ĉambro]”; c) “Li [en la ĉambro] vidis la rondan tablon [ankaŭ en la ĉambro]”.

Do... “en la ĉambro” povas rilati al “li”, al “la ronda tablo”, aŭ al ambaŭ. Sed en normala lingvouzado, tian ambiguecon ni facile akceptas kaj toleras, kaj plej ofte ni ne bezonas pli da precizeco. Krom tio, normale tia frazo okazus en iu kunteksto, kaj el la kunteksto oni povus kompreni la lokojn de la diversaj elementoj.

Kiam mi legas la frazon, tamen, la plej tuja kompreno estas “Li vidis [la rondan tablon en la ĉambro]”. T.e., “la ronda tablo en la ĉambro” funkcias kiel unu kompleta penso-unuo.

Se estas necese vortumi aferon tre precize (ekzemple, dum juĝeja proceso), oni devas uzi alian strukturon. Ekzemple, “Li,

## La NASKa Fasko

starante ekster la ĉambro, vidis la rondan tablon en la ĉambro.” Aŭ: “Kiam li staris ekster la ĉambro, li vidis ke en la ĉambro estis la ronda tablo.” Aŭ eĉ: “Li estis ekster la ĉambro; la ronda tablo estis en la ĉambro; kaj li vidis ĝin.” Kaj simile.

## Historio de mondfamaj nekonataj esperantistoj

de Harold GOODMAN

Vladimir SĈERAŝEVSKII (1897–1951) naskiĝis en Dva Ruĉja, urbeto apud Murmansk, cara Rusujo en jaro 1897. Lia patro estis funebraĵisto kaj mankis al li mono por lui lokon. Do, li devis fari sian komercon en la familia dometo. En 1899 la patrino forlasis la dometon pro tio, ke ŝi ne povis loĝi kun tiom multaj kadavroj. Tamen, Vladimir restis ĉe la patro. La patro instruis lin pri la funebraĵa komerco.

Bedaŭrinde, en jaro 1909 najbaro en la apuda loko, Svinajevskaja Rajon, eltrovis metodon elimini la morton. Poste, la Sĉeraŝevskija komerco disfalis. La patro do decidis labori en loka restoracio nomita *La Bela Mandrilo*. Unu kondiĉo de la laboro estis, ke li devis vesti sin mandrile. Do, la patro vojaĝis ĝis Moskvo por aĉeti mandrilan kostumon.

Kiam li revenis hejmen li malkovris, ke la restoracio estis fermita. Nun li havis mandrilan kostumon kaj multajn ŝuldojn. Li decidis fariĝi almozetanto en la centro de la urbo Murmansk. Dum la venontaj dek jaroj li akiris landfamon kiel la plej stranga almozetanto en Rusujo. Cetere, li edziniĝis denove kun bela virino nomita Karolina Flatfutova TERURINSĈEVA.

La filo, Vladimir, estis mallaŭta, saĝa, malbela knabo. Li estis tiel malbela, ke ofte

aliaj homoj erare pensis, ke li estis aŭ ŝtono aŭ arbo. Sed interne li havis multe da pensoj.

Unu tagon dum la Paskofesto, Vladimir pensis, “Mi ne volas resti en Murmansk. Fakte, mi volas vojaĝi tra la mondo.”

Unue li transformis sin en statuon de Kateřina la Grandulino, la antikva carino. Kiam homoj vidis la novan statuon ili ekkriis, “Hura! Hura! Certe, ĉi tiu statuo plaĉas al caro. Do, ni transloku ĝin Moskven.”

Kiam la fervojo alvenis al Moskvo, la reĝa kavalerio ricevis ĝin kun trumpetoj kaj multaj ĉevaloj. La kavalerio kune iris kun la statuo ĝis la Kremlo, kie loĝas la caro. Tuj, la statuo ŝanĝiĝis en formon de la germana verkisto GOETHE.

La Germana ambasadoro, Grafo Wilhelm von DREKHAUSEN la kvara, pagis monon por ekspedi la novan statuon de GOETHE al Bjalistoko. La ambasadoro havis bienon apud Bjalistoko. Do, li sendis la statuon de GOETHE tien.

En Bjalistoko Vladimir fariĝis Adam ZAMENHOF, la filo de Ludoviko. Fakte, li, Vladimir, ne konis Esperanton sed li nur laciĝis esti statuo.

Dum tri semajnoj li estis Adam. Fakte, la vera Adam estis en Varsovio ĉe la volapuka lernejo. Li disputis kun la patro kaj volis ĝeni lin. Kiam Vladimir, la pseŭda Adamo, troviĝis en la zamenhofa hejmo li lernis la internacian lingvon. Tamen, li ankaŭ komprenis ke la fakta Adamo devas reveni hejmen.

Do, post tri semajnoj li denove transformis sin en novan formon, tabak-butikiston. La resto de lia vivo estis tre enuiga.

## Eŭkaliptoj ĉe UCSD

de Ellen EDDY

La eŭkalipto estas unu el la simboloj de UCSD. Ĉu vi rimarkis kiom da ili troviĝas ĉi tie? La tereno nombras ĉirkaŭ 220 000 eŭkaliptojn. La eŭkalipta arbo originale venis al Kalifornio de Aŭstralio. Ekzistas 700 specoj en tiu lando kaj kelkaj el tiuj kreskas diversloke inter la konstruaĵoj ĉirkaŭ la universitato.

Oni originale importis la semojn por planti kaj krei novajn arbarojn por anstataŭi la rapide malaperantajn indiĝenajn arbojn. Tiu plano fiaskis ĉar la ligno facile fendiĝas kaj ne taŭgas por konstruado. Sed antaŭ oni eksciis tion, granda projekto komenciĝis ĉe UCSD.

Komence en 1910 kaj dum kelkaj jaroj poste, eŭkaliptoj estas plantitaj de 400 senlaboruloj kaj malliberuloj ĉe *Torrey Mesa* kie nun situas la nuna UCSD. Ili plantis 300 000 eŭkaliptajn arbojn, plejparte sukergumojn.

La restaĵo de tiu plantado estas la arbaro malantaŭ la studenta san-centro. Oni povas rimarki la rektajn vicojn de la planita plantado.

Dum jaroj la arboj kreskis kaj ne spertis problemojn. Sed en 1984 alvenis aŭstralia skarabo: la eŭkalipta longkorna boranto, kiu povas mortigi arbon en du semajnoj. Dum la 80-aj kaj 90-aj jaroj, centoj da arboj mortis kaj neniu sciis kiel halti la atakon.

En 1992, sciencisto malkovris etan vespon kiu estas parazito de la skarabo. La ovon de la skarabo infektas malmatura formo de la vespo, kiu poste maturiĝas en la

skaraba korpo kaj finfine eliras, mortigante la gastiganton.

Tiu parazito savis la eŭkaliptojn por iom da tempo. Poste venis aliaj insektoj, sed ili ne estis tiel danĝeraj kiel la unua skarabo. Nun la arboj frontas atakojn de eŭkaliptaj malamantoj kaj la buldozoj de konstruado. La universitato havas regulon kiu deklaras, ke kiam arbo estas detruita, alia devas esti plantita ie sur la tereno. Do verŝajne la eŭkaliptoj restos por ĉiam simbolo de UCSD.



**Noto de la redaktisto:** kelkaj arboj apud la bibliotekel *Geisel* estas fakte pseŭdo-eŭkaliptoj: lignaj trunkoj tegitaj per plumbo. (Ĉu ni nomu ilin “roboto-eŭkaliptoj”?)

Unu el la pseŭdo-eŭkaliptoj staras ĝuste antaŭ la ĉefa enirejo de la biblioteko. La aliaj du, kiuj kaŝas sin en la apuda arbareto, havas apartajn talentojn: unu parolas, kaj unu eĉ kantas. (Ne, tio ne estas tajp-eraro...)

## Ŝerco...

Iu NASK-studento rigardis sian foton sur la ĵus akirita studenta karto, kaj demandis al la fotisto:

“Sinjorino, ĉu ne ŝajnas al vi, ke sur tiu ĉi fotoĵo mi aspektas kiel idioto?”

“Ho, pardonu, sed ni ne havas la kapablon retuŝi la fotoĵojn.”

## Poemo el la germana

Bernhard afable peris tiun ĉi tradukon de *Schenken*, originale verkita en la germana de la verkisto kaj pentristo Joachim RINGELNATZ (1883-1934). La traduko, fare de anonima tradukinto, aperis en la gazeto *Sennaciulo* (Dec. 2007).

### Donacado

Donacu kun konfidenc',  
kaj se dec' ĝin permesas.  
Se l' donacato la donon pesas,  
puru la konscienc'.

Donu do kun plezur',  
laŭeble nur  
el via mi,  
de l' opini', gust' kaj humur',  
por ke via ĝojo pri l' procedur'  
estu pago por vi.

Sprite donu, sen ruzem'.  
Pensu en pac',  
ke la donac'  
vi estas mem.

## Ankoraŭ alia naĝejo

Por la naĝemuloj, Ellen informas pri ankoraŭ alia naĝejo, eĉ pli proksima al ni: la *Natatorium*. Por atingi ĝin, sekvu *Ridge Walk* sude de *AP&M* al la gimnastikejo *Main Gymnasium*. Malantaŭ tio vi trovos la *Natatorium*. Horaro: 12:00–1:30 ptm lunde ĝis vendrede.

## LLZ kaj programado

de Vido GILLET

Profesoro JORDAN memorigis nin komputistojn, ke verkante programon, oni foje malkovras defion tiel seriozan, ke necesas tute forĵeti la verkon ĝis tiam faritan, kaj denove ekverki kun pli sperta plano kiu aŭ evitas aŭ korektas kelkajn erarojn. Oni supozas, ke simile Doktoro ZAMENHOF povis korekti eraretojn kiam li rekreis sian lingvon.

Hazarde, li evidente evitis la “Influan de la Dua Sistemo”, alian fenomenon kiu afliktas komputistojn. Kiam oni unue konstruas sistemon, kutime oni havas malsufiĉe da tempo, spaco, aŭ mono, do oni konstruas nur la minimumon bezonatan por funkcii. (Foje, tiu fakte ne sufiĉas...)

Dum la unua klopodo, oni ekhavas ideojn pri perfekteco, sed ne povas tute realigi ilin. Do kiam oni poste refaras similan sistemon, oni tentiĝas fari tro multe, kaj estigi partojn kiuj mankis al la unua klopodo. Sed ju malpli da malperfekteco, des malpli da utilo.

La NASKan Faskon redaktas via afabla helpinstruisto Hoss, sed **li nepre bezonas vian helpon!** Ne timu, se vi ne sentas vin komforta pri verkado; Hoss helpos vin korekti kaj poluri. Ĝuste nun li *senpacience* kaj *avide* atendas viajn kontribuojn—ĉu fotojn, desegnaĵojn, artikolojn, poemojn, amo-leterojn... kion ajn. Sendu viajn materialojn perrete al [<nask.esperanto@gmail.com>](mailto:nask.esperanto@gmail.com) aŭ portu ilin piede al Asante#127.